# NSiR - Nova Sento in Rete
# N. 1171 (17/2023)

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana
Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet http://www.esperanto.it
Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet http://iej.esperanto.it
Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"
NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR
I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.
Le lettere non firmate non saranno pubblicate.
Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**
http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm

**LIBRERIA**
http://www.esperanto.it/libri.htm
feilibri@esperanto.it

**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**
Il Congresso Nazionale: http://kongreso.esperanto.it
Il Festival Giovanile di Pasqua: http://iej.esperanto.it/ijf

**BIBLIOTECA DI MASSA**
https://reprobi.erasmo.it


**IL 5 PER MILLE ALLA FEI**
Indicate il codice IVA **94006900024* (Gruppo E-ista Vercellese)**

*Indice articoli*

Assemblea annuale, e assemblea straordinaria .......... 2
IEJ, novaj esperantagoj .......... 3
Ĉu vi volas trapasi ekzamenon rete en 2024? .......... 3
Kurso pri la svahila en Esperanto .......... 4
Invito respondi enketilon .......... 4
Eŭropa Tago de la Lingvoj .......... 4
Komenciĝas la nova lernojaro .......... 5

## ASSEMBLEA ANNUALE E ASSEMBLEA STRAORDINARIA

Il 30 settembre prossimo si svolgeranno a Bologna, presso il Millenn Hotel di Bologna, via Cesare Boldrini 4, a due passi dalla Stazione Centrale, due assemblee, straordinaria e ordinaria , della Federazione Esperantista Italiana.




La straordinaria, convocata per le ore 10 in prima convocazione, e per le 11 in seconda, deve approvare il nuovo Statuto della FEI, modofica necessaria per poter aderire al Registro Unico Nazionale del Terzo Settore, che ci permetterà, tra le altre opportunità, di continuare a riceve i contributi del 5 per mille ottenuti attraverso le dichiarazioni dei redditi.

L'ordinaria, convocata per le 13 in prima e per 14 in seconda convocazione, ha lo scopo di analizzare l'attività sociale passata, e pianificare la futura, anche attraverso l'elezione del nuovo Consiglio Nazionale, che coordinerà le nostre azioni per il periodo 2023-2026.

Partecipate!

## IEJ: NOVAJ ESPERANTAGOJ!



ESPERANTAGOJ A VERCELLI!
La IEJ è lieta di presentarvi il secondo appuntamento con gli EsperanTagoj, stavolta a Vercelli!
L'evento si terrà il 16 e 17 settembre a Vercelli, città piena di storia e cultura nella quale passeremo due giornate a conoscerci e a scoprire questa bellissima lingua!
Ci si può iscrivere, gratuitamente, al link seguente: https://docs.google.com/.../1rpwEoiW.../edit

Vi aspettiamo numerosi!

## ĈU VI VOLAS TRAPASI ESPERANTO-EKZAMENON RETE EN 2024?

La unulingvaj Esperanto-ekzamenoj de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER-ekzamenoj) estas unu el la plej gravaj servoj de UEA, realigataj de sia KER-Ekzamena Centro (KER-EC), kunlabore kun la Akademio de Esperanto kaj la retejo Edukado.net. Ili ekzistas en la niveloj B1, B2, C1 kaj C2 kaj eblas ilin trapasi surloke, en specifaj okazoj, aŭ rete, laŭ specifa kalendaro. Por la jaro 2024 KER-EC planas retajn ekzamenojn je ĉiuj niveloj. Ankoraŭ ne estas certe pri surlokaj ekzamenoj. Pro tio tre gravas, ke interesatoj respondu enketon, per kiu eblas indiki sian interesiĝon trapasi la ekzamenon rete. La respondoj al la enketo povas influi la elekton de la ekzamenperiodo. La enketilo por la jaro 2024 jam disponeblas ĉe Edukado.net kaj UEA bonvenigas interesatojn ĝin respondi: https://edukado.net/ekzamenoj/ker/!  enketilo</span>.

La ekzamensistemo por la niveloj B1, B2 kaj C1 estas validigita de la ŝtata ekzamencentro ORIGO de la Universitato Eötvös Loránd de Budapeŝto. La ekzamensistemo por la nivelo C2 estas validigita de la Akademio de Esperanto. La KER-ekzamenoj estas speciala stimulo al Esperanto-parolantoj je progreso kaj perfektiĝo en la kono kaj uzo de nia lingvo. Ili ekzistas laŭ la tipoj nur skriba, nur parola kaj kompleksa (skriba plus parola). Tiuj, kiuj neniam antaŭe ekzameniĝis, povas elekti la nivelon kaj la tipon en kiu oni fidas sukcesi. Tiuj, kiuj jam sukcesis en iu nivelo kaj/aŭ tipo povas konsideri novan ekzameniĝon je pli alta nivelo kaj aliaj tipoj, se ne temis pri C2 kompleksa. Specimenoj pri ĉiuj niveloj kaj tipoj troviĝas ĉe Edukado.net: https://edukado.net/ekzamenoj/ker/specimenoj. Por ekzerci sin en la parolado (kaj ensociiĝi) UEA rekomendas la programon Ekparolu! de Edukado.net: https://edukado.net/ekparolu/prezento. Por regula legado kaj aŭskultado de tekstoj en facila Esperanto: https://uea.facila.org.

Aldone en la enketilo respondantoj povas informi, ĉu ili ŝatus partopreni apartan preparsesion por la retaj ekzamenoj (per Zoom), kiun KER-EC okazigos je unu-du monatoj antaŭ la anoncota dato de la ekzamenoj. Ankaŭ eblas informi ĉu oni ŝatus trapasi prov-ekzamenon, per kiu oni povas en la ekzamenpaĝo interage solvi malnovan teston kaj ekscii sian rezulton. Tia simulita ekzameno multe povos helpi en tio, ke oni povu bone taksi sian nivelon. UEA kuraĝigas ĉiujn esperantistojn prepariĝi kaj trapasi KER-ekzamenon. Pri la KER-Ekzamena

Centro de UEA respondecas Katalin Kováts (direktorino), Zsófia Kóródy (reprezentanto de UEA ĉe Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo - ALTE) kaj Renato Corsetti (konsilanto).

## KURSO PRI LA SVAHILA EN ESPERANTO

Kurso pri la sŭahila en esperanto: https://suahilakurso.swahili.it/
aliĝu aŭ petu pli da informoj, renato@esperanto.org

## INVITO RESPONDI ENKETILON PRI LA ESPERANTO-MOVADO KAJ UEA

Universala Esperanto-Asocio (UEA) preparis malfermitajn enketilojn por konatiĝi kun ideoj kaj impresoj de esperantistoj, ĉu membroj ĉu nemembroj de UEA, pri la movado kaj la Asocio. La enketiloj estis konstruitaj tiel, ke por respondi oni devas bezoni malpli ol 10 minutojn. La ĉefan parton eblas rapide respondi nur per klakoj, sed ankaŭ eblas pli detale (nedevige) komenti. La partopreno de ĉiuj utilos por doni bazon por la lastaj konsideroj pri la strategio de UEA.

Ĉiuj bonvenas respondi kaj kundividi la enketilojn. Jen la du versioj:
- por membroj de UEA: https://www.surveymonkey.com/r/uea_membroj;
- por nemembroj: https://www.surveymonkey.com/r/uea_ne-membroj.

Ĉar la respondoj subtenos la Asocion pripensi strategiajn alirojn por si kaj por la movado, UEA antaŭdankas pro ĉies partopreno. Apartan dankon, se vi jam respondis pro antaŭaj komunikoj pri la enketiloj. Duncan Charters, prezidanto de UEA, kunordigas la laborojn. Rezultoj de la enketado estos montrataj en raportoj al la Komitato de UEA, en la revuo Esperanto kaj en specifaj programeroj en eventoj kiel la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), okazonta inter la 23-a kaj la 26-a de novembro 2023.

## EŬROPA TAGO DE LA LINGVOJ

Karaj eŭropaj esperantistoj,
la 26-a de septembro ankaŭ ĉi-jare oni festas la eŭropan tagon de lingvoj, https://edl.ecml.at/. En tiu tago ankaŭ esperanto-asocioj aŭ lokaj grupoj eble aranĝos eventojn aŭ partoprenos eventojn aranĝitajn de aliaj. ni petas vin en tiu tago transdoni, kiel vi trovos oportune, rete aŭ papere, la mesaĝon, kiun vi trovas en https://uea.org/vikio/Kategorio:Kampanjo_Esperanto_por_multlingva_E%C5%ADropo.

Dankon pro tio, kion vi povos fari nome de la Komisiono por agado en Eŭreopo de UEA, EEU kaj EDE.

## KOMENCIĜAS LA NOVA LERNOJARO!

